


# SUDFRANCIA STELO




Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono

N° 135 - 4a kvaronjaro 1995 - Jarabono : 3OF

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP956-28P Montpellier  
chez L. Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel



La viadukto  
de Chamborigaud (30)  
rendevuas kun vi  
je la 4a kaj 5a de Majo 1996  
por la Federacia kongreso. Ĝis!



UN PONT

ENTRE LES

PEUPLES



PONTO

INTER LA POPOLOJ

☆☆☆

## Kelkaj rendevuoj en 1996

25 II - 3 III : Ĥorirejnado en La Freychède (Ariege)

6-8 IV : Sat-Amikara kongreso en Orly

4-5 V : Federacia Kongreso en Chamborigaud

13-19 V : Franca Kongreso en Liono

12-16 VI : Printempa staĝo en Batipaume (Agde)

13-20 VII : Sat-kongreso en Sankta Peterburgo (Rusio)

20-27 VII : Universala Kongreso en Prago (Ĉeĥio)

9-16 IX : Internacia Semajno en Sète.

☆☆☆

*Notu la datojn kaj nepre partoprenu !*

☆☆☆

## KALENDARO 1996

POR LA JARO

SEMajNOJ	JANUARO					FEBRUARO					MARTO				
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13		
LUNDO	1	8	15	22	29	5	12	19	26	4	11	18	25		
MARDO	2	9	16	23	30	6	13	20	27	5	12	19	26		
MERKREDO	3	10	17	24	31	7	14	21	28	6	13	20	27		
ĴAŬDO	4	11	18	25	1	8	15	22	29	7	14	21	28		
VENDREDO	5	12	19	26	2	9	16	23	30	1	8	15	22	29	
SABATO	6	13	20	27	3	10	17	24	2	9	16	23	30		
DIMANĈO	7	14	21	28	4	11	18	25	3	10	17	24	31		
SEMajNOJ	APRILIO					MAJO					JUNIO				
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13		
LUNDO	1	8	15	22	29	6	13	20	27	3	10	17	24		
MARDO	2	9	16	23	30	7	14	21	28	4	11	18	25		
MERKREDO	3	10	17	24	31	1	8	15	22	29	5	12	19	26	
ĴAŬDO	4	11	18	25	2	9	16	23	30	6	13	20	27		
VENDREDO	5	12	19	26	3	10	17	24	31	7	14	21	28		
SABATO	6	13	20	27	4	11	18	25	1	8	15	22	29		
DIMANĈO	7	14	21	28	5	12	19	26	2	9	16	23	30		
SEMajNOJ	JULIO					AUGUSTO					SEPTEMBRO				
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13		
LUNDO	1	8	15	22	29	5	12	19	26	2	9	16	23	30	
MARDO	2	9	16	23	30	6	13	20	27	3	10	17	24		
MERKREDO	3	10	17	24	31	7	14	21	28	4	11	18	25		
ĴAŬDO	4	11	18	25	1	8	15	22	29	5	12	19	26		
VENDREDO	5	12	19	26	2	9	16	23	30	6	13	20	27		
SABATO	6	13	20	27	3	10	17	24	31	7	14	21	28		
DIMANĈO	7	14	21	28	4	11	18	25	1	8	15	22	29		
SEMajNOJ	OKTOBRO					NOVEMBRO					DECEMBRO				
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13		
LUNDO	7	14	21	28	4	11	18	25	2	9	16	23	30		
MARDO	1	8	15	22	29	5	12	19	26	3	10	17	24	31	
MERKREDO	2	9	16	23	30	6	13	20	27	4	11	18	25		
ĴAŬDO	3	10	17	24	31	7	14	21	28	5	12	19	26		
VENDREDO	4	11	18	25	1	8	15	22	29	6	13	20	27		
SABATO	5	12	19	26	2	9	16	23	30	7	14	21	28		
DIMANĈO	6	13	20	27	3	10	17	24	1	8	15	22	29		

La Internacia Esperanto - Instituto (IEI) fondiĝis en 1930  
Ĝi - disvastigas Ĉseh-metodon kaj edukas Ĉseh-instruistojn  
- D-ro L. L. Zamenhof vivis de la 15-a dec. 1859 ĝis la 14-a apr. 1917  
- 15-a dec. Tago de E-libro.  
- La Unua Libro de Esperanto aperis la 26-an de julio 1887

"Sudfrancia Stelo" deziras al siaj legantoj :  
**FELIĈAN JARON 1996 !**



**Legu pri la evento de la trimestro sur la paĝoj 8 k.9**  
**L'évènement du trimestre se trouve pages 8 et 9.**

☆☆☆

## Enkondukaj vortoj :

Pro strikoj en Decembro, kontribuoj por la bulteno ne alvenis kaj konsekvence SFS aperas malfrue.

Tamen la jaro 95 finiĝis pozitive por esperanto per kvazaŭa kristnaska donaco, t.e. longa artikolo en "Midi Libre" je la 26a de Decembro kun mencio de esperanto...sur la frontpaĝo ! (vidu p. 8 kaj 9)

La sama gazeto, kiu ne ĉiam favoris nin (ni memoru pri la kongreso de Agde !), ankaŭ aperigis leterojn de legantoj (kaj de konataj esperantistoj) pri la internacia lingvo (vidu p. 7) ; ĉifoje ne aperis rebatletero kontraŭ esperanto.


Tiuj eventoj instigu nin plue kaj plie informi pri E°, ne nur la gazetaron, sed simple niajn konatojn, amikojn, kolegojn, najbarojn, ktp. Informi, varbi, instrui, konservi...ne facila vojo, kiel vi scias.

Bonan kuragon ! Bonan Novjaron !

La redaktoro : J. Hénin

## Pli frua pensiĝo

El cent viroj 60-64-jaraj laborade



En multaj industriaj landoj viroj pensiĝas pli kaj pli frue, kiel montras la komparo kun la antaŭa generacio, kiun elkalkulis Internacia Labor-Organizaĵo (ILO). Tion kaŭzas precipe pli ofta malsaniĝo. Tiu evoluo unuflanke utilas por iom redukti senlaborecon, sed aliflanke kaŭzas problemojn por la pensiokasoj.



CERL en Liono eldonis por la jarfinaj festoj koloran poŝtkarton : trajneto kun la enskribo "Feliĉan Novjaron" ruliĝas ĉirkaŭ la terglobo. Mendilo estas havebla de SFS...por 1997... (maldekstre)

Diagramo aperinta en la decembra numero de "Monato" pri la problemoj de pensiĝo (dekstre). Samtempe okazis en Francio strikoj, parte pri kaj pro tiu temo.

## 1996

Langvedokanoj estos bonŝancaj en tiu nova jaro. Du E°-staĝoj disvolviĝos en ilia regiono en kutime tre agrablaj monatoj, Junio kaj Septembro, sen la somera turisma tumulto. Ambaŭ staĝoj disvolviĝos ĉe la marbordo aŭ tre proksime de la marbordo. Por la unua en Agde, mezjunie, Jeannine Vincent, bone konata en la E°-medioj, anstataŭos Jean Thierry por la triagrada kurso. Por la dua staĝo, pli precize nomata Internacia Semajno, mezseptembre en Sète, internacia etoso estas garantiita kiel kutime. Por tiuj du ĝuindaj eventoj, vi trovos informojn kaj aliĝilojn en tiu-ĉi bulteno.

*Les Languedociens auront de la chance en cette nouvelle année. Deux stages d'espéranto se dérouleront dans leur région, pendant deux mois habituellement très agréables, Juin et Septembre, sans le tumulte touristique de l'été. Les deux stages se dérouleront au bord de la mer ou très près du bord de mer. Pour le premier, à Agde à la mi-Juin, Jeannine Vincent, bien connue dans les milieux espérantistes, remplacera Jean Thierry pour le cours du 3° degré. Pour le 2° stage, plus précisément dénommé Semaine Internationale, à la mi-septembre à Sète, une ambiance internationale est garantie comme d'habitude. Pour ces deux événements à savourer, vous trouverez des informations et des bulletins d'adhésion dans ce bulletin.*



Ni anoncis lastbultene, ke la UK de 98 eble okazos en Montpellier. Pri tio decidis UEA post kelkaj semajnoj. Ĉiukaze la grupo de Montpellier jam antaŭvidas LKK-on (lokan kongresan komitaton). Povas ĝin partopreni ĉiuj bonvolemaj esperantistoj, kiuj volas apogi tiun entreprenon. Homfortoj estas bezonataj por diversaj taskoj dum la kongresa semajno. Sin anonci al SFS aŭ al Yvette Vierne 5, Rue Docteur Roux 34000 Montpellier, telefono : 67 54 15 43. Elkorajn dankojn.

*Dans le dernier bulletin nous avons annoncé que le Congrès Universel de 98 se déroulerait peut-être à Montpellier. De toutes manières le groupe local prévoit déjà un comité pour le congrès. Peuvent y participer tous les espérantistes de bonne volonté qui veulent soutenir cette entreprise. Des aides sont nécessaires pour différentes tâches pendant la semaine du congrès. S'annoncer auprès du bulletin ou de Yvette Vierne dont les coordonnées sont indiquées ci-dessus. Merci de tout coeur.*



Ĉijare la abono al SFS ne estos senpaga, tamen ĝi restos je la sama nivelo : 30 F por 4 numeroj. Evitu al ni kroman laboron por sendi malagrablan realvokon, ktp. La adreso de nia kasistino estas sur la unua paĝo (se vi estas membro de grupo, pagu al via grupkasist(in)o). Anticipan dankon ! Cette année, l'abonnement à SFS ne sera pas gratuit, toutefois il restera au même niveau : 30 F pour 4 n°. Evitez nous du travail supplémentaire pour vous envoyer un rappel désagréable. L'adresse de notre trésorière se trouve sur la 1<sup>re</sup> page (si vous faites partie d'un groupe, payez au trésorier de votre groupe). Merci à l'avance !



# VIVO DE LA GRUPOJ :

## BEZIERS

**Zamenhofa Tago:** La 9an de Decembro kunvenis pli ol 30 personoj por la Zamenhofa tago. Kelkaj venis el Montpellier, Perpignan, La Canourgue, ktp, la plimulto el Béziers kaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉar ne eblis kunveni en la "Domo de asocioj" kiel antaŭvidite, J.P. Peray sukcesis disponigi al ni taŭgan salonon en la urbdomo de Pierrerue. Belaj plurkoloraj menuoj, zorge preparitaj de Jean-Pierre ornamis la tablojn. Suzanne Authier, nia prezidantino, prezentis ĉiujn partoprenantojn kaj kelkvorte memorigis nin pri la kialo de tiu tago. Ĉiuj ĝuis la delikatan kaj ekzotikan tagmanĝon. Gratulojn al la gekuiristoj ! Se vi ne partoprenis, ĝuu la menuon mense (vidu ĉi-poste !). La famkonata triopo ludis "Prunto" de Bukar kaj ricevis varmajn aplaŭdojn. Ĉar la vidbendo "E° tra la mondo" ne alvenis ĝustatempe pro la poŝta striko, ni spektis vidbendon pri Prago, kie okazos la UK de 96, kaj la unuan lecionon de la kurso "Mazi en Gondolando" (Jam pli ol 2000 kopioj de tiu nova kurso estas venditaj !). Dankojn al la organizintoj de tiu agrabla tago. Ĝis 96 !

LE CERCLE BITERROIS

☆☆☆

### D'ESPERANTO

SE REJOUIT DE VOUS ĜOJAS VIN AKCEPTI  
ACCEPTER A LAFÊTE OKAZE DE LA JARA  
ANNUELLE ZAMENHOF-FESTO  
ZAMENHOF 1995 1995  
9 DECEMBRE 9an de DECEMBRO

à / ĉe

La MAISON DE LA VIE  
ASSOCIATIVE

15, rue du général Margueritte  
34500 BEZIERS

Programme/ Programo

à 11h.30 apéritif suivi  
d'un repas amical.


(Participation aux frais, modeste)  
après libation et ripaille  
après-midi récréatif :  
chants, poésie,  
sketch et film !

Esperanto dans  
le Monde.


je 11h30 aperitivo

amika tagmanĝo (elspe-  
za partopreno, ne multe-kosta)  
post drinko kaj man-  
ĝodiboĉo, distra post-  
tagmezo: Kantoj, poezio,  
skeĉo kaj filmo

Esperanto tra  
la Mondo



"L'Espéranto pour  
tous les hommes de  
bonne volonté"



### ZAMENHOF-TAGO

9an de decembro 1995

### MENUO

Aperitivo kun amuzaĵoj .

La GIGI / ĴAJA

Afrodiz(iak)a elsezona salato !

la SUZI / JOPO

India / Malgaŝa KAREO

kun

banano, pomo, zingibro-sauĉo kaj rizo !

Aŭtobuse alvenita delonge la kunveno

Fromaĝo el la Montara regiono !

Jus kolektitaj en la BOURBOUILLE la

Junaj freŝaj Mandarinoj de

la sekretariino !

Elektita

sed ne kuirita , ne kunportita de Daliaflor' la

**KUKO DE LA BLANKA**

**REGINO**

el Kantarel-strato !

Bonan vinon ne avare trinkos  
sed vi evitos ĝin ĝisebrie !  
Freŝan kafon vi gustumos  
por ke digesto funkciu sane !



### Venontaj kunvenoj de la grupo :

Senescepte la tri venontaj kunvenoj okazos sabate je la 14h30 en la Domo de Asocioj. Pro la anonco en la federacia bulteno, ni ne sendos individuajn kunvokilojn. Do, bonvolu noti kaj ne forgesi la datojn de la 10a de Februaro, 9a de Marto kaj 13a de Aprilo.



A l'attention des membres de Béziers : prochaines réunions les samedis à 14h30, Maison des Associations, les 10 Février, 9 Mars et 13 Avril. Pas de convocations individuelles, cet avis en tenant lieu.

☆☆☆

**STAĜO :** bonvolu noti, ke la definitivaj datoj estas de la 12a ĝis la 16a de Junio, do en milda periodo. Vidu la detalajn informojn, eltiritajn el la kolora informilo "El la Efebo". Denove tri gradoj, do komencantoj estos bonvenaj. Gvidos la trian kurson Jeannine Vincent.

☆☆☆

**Forpaso:** Forlasis nin en Oktobro Sro Raoul Bayou, eks-deputito kaj -urbestro de Cessenon. Inter aliaj, li estis unu el la deponintoj de la leĝpropono por E°. Li ĉiam klare kaj konvinke subtenis Esperanton. Al lia familio, nian sinceran kondolencon.

☆☆☆



Efebo, C.B.E.  
Organizantoj  
de la Printempa staĝo,  
bondeziras al vi ĉiuj  
bonan, agrablan feliĉan  
studjaron 1996  
Vivu kaj progresu Esperanto !

Staĝo en AGDE de la 12a ĝis la 16a de JUNIO 1996

el la prezidantino

"Kiom malfrue okazos la staĝo ĉijare" certe vi ekkriis, leginte la kapvortojn. Jes ! Mi respondas : pro la Lyon-a kongreso neblis konservi la datojn de la ĉielira semajnfino ; poste la feridomoj jam rezervis aliaj grupoj.

Do... Sed ni ĝoju, ĉar la vetero estos pli varma, la tagoj pli longaj kaj vi povos plene ĝui la restadon en Batipaume.

Mi ne plu bezonas prezenti la staĝojn kaj ĝian agrablan etoson. La situo, meze de kamparo, ne tro ĝenas, ĉar vi venas por labori, ne por butikumi... Se tamen foje vi deziras viziti Agde, vi certe trovos bonvoleman ŝoforon por vin konduki ĝis la urbeto por (eĉ) butikumi aŭ al la banurbo Cap d'Agde.

La unua vespero estos interkonatiĝa, sed la aliajn okupos distraĵoj. Ni ŝatus, ke la staĝanoj aktive partoprenu al tiuj distraj vesperoj. Se vi havas hobion (aŭ eĉ talenton) proponu vian helpon. Ekzemple vi povus prezenti lumbildojn aŭ filmon pri via regiono aŭ vojaĝo. Ne necesas esti fakulo; se vi timas pri la prezento en esperanto, ne zorgu, ni helpos vin lingve. Sufiĉas diri al ni tion - pere de la aliĝilo - por ke ni havu la taŭgajn aparatojn.

Eble vi kapablos ludi muzikon (per portebla instrumento) aŭ danci, aŭ kanti, diri poemon, magii, ludi skeĉon, prezenti vian profesion k.t.p. La eblaĵoj estas multaj. Ne bezonas longe prezenti, okupi la tutan vesperon : pluraj personoj mallonge agantaj sinsekvos. Despli bone ! La vespero estos varia, despli plaĉos. Necesas nur iom da bonvolemo kaj entuziasmo por la plezuro de ĉiuj. Invitu viajn geamikojn partopreni, komenci la studadon de la lingvo.

Certe ili kaj vi ne bedaŭros la restadon en Batipaume. Ni atendas vian baldaŭn aliĝon (tio multe helpos nin) kaj viajn proponojn; ni diras al ĉiuj : "ĝis baldaŭ !".

La Prezidantino : S. Authier



### Kie Batipaume ?

Savez-vous que Batipaume se trouve entre terre et ciel, et aussi entre mer et ville en pleine campagne: à 2km de la mer (15mn à pied) et 2km de Agde (aussi 15mn à pas de crabe) ?



### La Kuniklino kaj la Krabo.

Sur freŝa herbo iu matene...  
lacertumis kuniklino.  
Pri esperanto ŝi revis,  
nerapide ŝi aktivis.  
Sur freŝa herbo iu matene...  
oblikiris dika krabo,  
al esperanto li kuris  
rapide kaj bonhumuris.  
"Kien tiel vi rapide iras ?"  
la kuŝantin' digne diras.  
"Al la staĝo kiel konsul",  
mi alvenas de la insul".  
Diris li al la bela kuniklin'  
"Mi ne devas ja, karulin'  
atendi ĉar esperanto  
komencos je la ĉi-nokto!"

afable diris li,  
dum pigre restis ŝi:  
"Tempon mi havas, sed mi kutime!  
en Batipom' tutproksime,  
alvenas por inaŭguro  
sen trompeto kaj tamburo.  
Mi ne paradas dum tuttagmezo  
en la parko kun komplezo.  
Vi scias ke pli rapide  
foriras mi laŭlegende,  
dum vi oblikve, kiel limako,  
marŝas." Diris la sen fako  
ekdormanta sur la herbo.  
"Ĝis baldaŭ" diris ĝoje  
la insulano ja perlaŭtvoĉe.  
Al kunveno nia krabo

de la -Fiŝo Esperanto  
Societo -inaŭguris  
la novan staĝon per prelegeto,  
kiun membroj tre aplaudis  
Baldaŭ estis inaŭgurfino.  
La kuniklin' ĵus alvenis  
kiam ĉiuj jam foriris.  
La moralo de tiu afero  
interesas ĉiuj ne tro:  
"tiu, kiu lacertumas  
pri kuirarto ne profitas"

"sen ĉapelo ĉe la suno  
ne restu tro kiel pruno".  
"Ne restu sen volba ĉapelo  
aŭ ŝirnu vin per sunombrelo".

Ji-Pe

### "l' Ephèbe d'Agde"

La muzeo de Agde, kies specifeco estas la submara arkeologio, posedas riĉan trezoron elirita el la maro en tiu mediteranea regiono. Sub la instigo de komercdisvolviĝo en la "Mare nostrum" kaj dank'al la trefavora estuaro de la riverego Hérault, la antikvaj ŝipoj povis atingi facile urbeton kies nomo estis "Agate-Tyche", kiu signifas "Bona-n Fortuno-n". Agde iĝis tre grava masilia kontoro ne nur la eksterkaj enlanda komerco rapide kreskis sed ankaŭ la kultura aktiveco, ĝi rilatis kun la tuta Mediteraneo. La enmara malkovro de diversaj objektoj pravigas tiujn dirojn. Ne nur en la antikveco la haveno akceptis eksterlandajn varojn, meblarojn, k.t.p. sed ankaŭ dum la Mezepoko aŭ Modernaj Tempo. Agde estas pli ol 2500 jaraĝa.

La statuo de la Efebo estis trovita en la riverego tute proksime de la katedralo en 1964. La korpostrukturo kaj la sinteno de la junulo estas tute grekdevena. Lia vizaĝo iom melankolia estas mirinde gracia. Ofte oni referencas tiun portreton al tiu de Aleksandro la Granda. Tiu mirindaĵo vi povos vidi en la muzeo de Cap-d'Agde kun aliaj maraj trovaĵoj.

### Ĉu hazarde vi enuas?

#### Kion do fari?

La organizantoj de la staĝo ne ŝatus vidi malfeliĉan vizaĝon, kiu enuas, dum la libertempo, por fronti al tia spektaklo jam de tri jaroj ni organizas iniciadon al joko matene kaj akvarelo posttagmeze. Tiuj du aktivaj eksterkurse ŝajnas plaĉi al la partoprenantoj despli, ke lastan jaron mirindaĵo rezultis. Tiuj aktivaj estas tute liberaj, ĉiujrajtas uzi sian libertempon, kiel ili deziras.

Ĉijare tion ni daŭrigos por via plezuro. Matene Daniel garantios al vi tutagan mensan freŝecon kaj sanon per nur kelkaj joko-movoj por fronti kuraĝe al la kurso. Posttagmeze al la akvareloplezuro ni aldonos tiun de la guaŝo. Ni uzos minimuman materialon. Petu klarigojn, se tion vi bezonas, por pli da informoj sendante vian aliĝilon.

Promenado tra la kamparo ankaŭ povas vin allogi, ne mankas padoj. La maro sufiĉe proksima atendas tiujn, kiuj ŝatas sunbani sur la varma sablo. La diversaj muzeoj en Agde kaj le Cap-d'Agde akceptos vin se tio al vi plaĉus.

### Pri akcepto je via alveno!

La plena akceptkomitato, kiu konsistas el du personoj, la prezidantino kaj la kasistin-sekretariin-poetino tronos sub la floritaj palmoj de la ĵurasa parko de Batipom'. Kun multe da gracieco ambaŭ akceptos vin. Indikos vian ĉambron, eĉ se necesas kondukos vin en vian kvartagan rifuĝejon. Ek de la 15a horo ili sentime atendos vin.

Apud Agde, la "nigra perlo",  
proksime de la blua mar'  
pli beligitas de la verdaĵoj  
agrabla restadejo kore invitas vin.

Batipaume : jen ĝia nom'  
jam fidelaj samideanoj  
konas tiun ĉarman pacejon  
kaj, kiel hirundoj, al ĝi flugas pritemp'.  
por ĝui distran studadon,  
ĉu la malnovaj, ĉu la novaj,  
ĉiuj staĝanoj estos bonvenaj.  
eĉ ili rajtos, en valizon  
meti talentojn kaj... krokodilon !  
Vivu la stel' kaj Batipom'  
ĝis la revido en junio !

Fernande

5

\*\*\*\*\*

\* **ALIĜILO** \*

\* ..... \*

\* Nomo : ..... \*

\* Persona nomo : ..... \*

\* Adreso : ..... \*

\* ..... \*

\* Poŝtkodo k. urbo:  ..... \*

\* Telefonnumero : ..... \*

\*\*\*\*\*

**Mi partoprenos kaj alvenos:** (*elektu farante krucon en la elektita ĉelo*)

1°  Aŭtomobile rekte al Batipaupe.

2°  Vagonare ĉe la stacidomo de Agde la ... de junio je la ... h. .  
 Ŝoforo atendas vin ĉe la stacidomo (*kompletigu per la tago k. horo*)

3°  Sola . ;  kun ..... (*ĉiĉele respondu por 1° k. 2°*)

xx

**Prigastado:** Mi deziras :

Unulitan ĉambron

Dulitan ĉambron

Mi deziras loĝi kun ..... (*geedzoj ne plenigu*)

**Antaŭpago** formulota je la nomo de:

**"Fédération Départementale Espéranto de l'Hérault"**

Ĉiletere vi trovos ĉekon (*aŭ alia*) de .... FRF

Banko. ....

xx

**KURSNIVELO**

Mi deziras ĉeesti ĉe la kurso

**KOMENCANTA**  ; **PROGRESANTA**  ; **SUPERA**

Mi deziras trapasi ekzamenon : Jes / Ne

Se jes, de kiu grado : .....

xx

**Helppropoj por la distraj vesperoj !**

Ĉiuj ajn proponoj estos bonvenaj por distraj vesperoj : prelego, diapozitivoj, skeĉo, k.t.p.

.....

.....

.....

.CERCLE BITERROIS D' ESPERANTO

**13a PRINTEMPA**

**ESPERANTO - STAĜO 1996 EN AGDE**

Hérault - France

de la 12a ĝis la 16a de junio 1996

**Akcepto** : merkredon 12an de junio posttagmeze ekde la 15a h.

**Staĝfino** : dimanĉon 16an posttagmeze.

**Adreso** : Feridomo de BATIPAUME

Route de Rochelongue - 34300 AGDE

\*\*\*\*\*

**KIOM KOSTOS ?**

**Aliĝkotizo** : 160 FRF ĝis la 5a de majo  
 250 FRF post la ĉisupra dato .  
*Senpaga por la gejunuloj malpli ol 25 jaroj kaj la eksterlandanoj.*

**Pensiono-prezo** : 200FRF tage kaj persone (*ĉio entenata*)  
 + 20FRF por unulita ĉambro (*tage*)

**Do kvartaga pensiono:** 800FRF en dulita ĉambro. (*persono*)  
 880FRF en unulita ĉambro.

**Antaŭpago** : 360FRF (200+160) antaŭ la 5a de majo  
 450FRF (200+250) post la 5a de majo.

formulu ĉekon aŭ poŝtmandaton je la nomo de:

**"Fédération Départementale Espéranto de l'Hérault"**

\*\*\*\*\*

**SENDU VIAJN KORESPONDAĴOJN al**

C.B.E.  
 9, rue Georges Picot  
 34500 BEZIERS

*Se vi deziras respondon kaj/aŭ pliajn informojn, bonvolu aldoni aŭ frankitan koverton.*

## MONTPELLIER

**Iniciadstagoj:** 3 sabataj posttagmezoj estis antaŭviditaj de Oktobro ĝis Decembro. Malgraŭ la promesoj, neniu sin prezentis...krom du geesperantistoj.

☆☆☆

### Monataj kunvenoj:

La 10an de Januaro oni festis la reĝojn en la Paillade, manĝis kukojn kaj trinkis ŝaumvinon...

La 7an de Februaro en "L'Escoutaire", L. Ensueque prezentos lumbildojn pri Helsinki (UK 95).

La 13an de Marto en La Paillade: Prelego kaj diskuto pri la temo "historio de la ciferoj".

La 3an de Aprilo en "L'Escoutaire": konversacio pri aktualaĵoj.

☆☆☆

**Planoj:** la venonta Internacia Semajno de Sète disvolviĝos de la 9a ĝis la 16a de Septembro, do ne de sabato ĝis sabato kiel kutime (despli bone por tiuj, kiuj volas profiti fervojan rabaton).

Legu la apartajn informojn pri la staĝo.

**UK de 98:** la anonco en la lasta bulteno estis surprizego por ĉiuj legantoj kaj pluraj petis konfirmon. Oni devas plu atendi la UEA-an decidon, ĉu favoran, ĉu malfavoran. Ĉiukaze pluraj Montpellieranoj eklaboris por la projekto; pliaj bonvolemluloj estos bonvenaj por la kongreskomitato (vidu la alvokon sur la dua paĝo): Esperanto estas ĉies afero.

☆☆☆

**Midi-Libre:** Gazetistino intervjuis plurajn grupanojn la 26an de Novembro, ankaŭ venis fotisto.

Unu monaton poste aperis longa interesa artikolo (kiun vi povas legi en SFS). Ankaŭ aperis pluraj leteroj de legantoj, favoraj al esperanto, en la sama gazeto. (p. 7)

☆☆☆

## PERPIGNAN

**Reorganizado de la grupo:** R. Llech-Walter restas prezidanto, R. Benazet estas vicprezidanto kaj kursgvidanto, C. Gérard-Voinçon la sekretario kaj R. Testas la kasisto. Adreso de la sidejo: 72, Avenue Général De Gaulle, dank'al la sindonemo kaj efika helpo de R. Llech-Walter.

**Kursoj:** Du kursoj ĉiumarde, la unua (de la 15a ĝis 16a horo) por komencantoj; 6 partoprenantoj inter kiuj unu sveda studentino, la dua perfektiga (de la 16a ĝis la 17a horo) kun 10 partoprenantoj. Krome, 3 gesamideanoj, kiuj ne povas ĉeesti la kurson, ricevas la koncernan materialon, kaj resendas la taskojn por korektado. Nuntempe Belga studentino preparas tezon pri esperanto.

☆☆☆

## ĈE NIAJ NAJBAROJ:

### ARDECHE

Ana kaj Ljo (adreso: Esperanto, Lafigère O7140 Malarce, tel 75399979) aranĝis la 25an kaj 26an de Novembro "renkontiĝon de pacamantaj esperantistoj". Malfeliĉe la informo alvenis tro malfrue por la lasta bulteno. Bone, ke E° vivas en tiu parto de la mondo, ne malproksima de Chamborigaud, loko de nia venonta federacia kongreso. Espereble kelkaj Ardeŝanoj partoprenos nian kongreson kaj ni antaŭĝojas.

*Funebro:* La informo alvenis seka: Paulette Bascou el Privas forpasis en la nokto 26a/27a de Decembro. Verŝajne ŝi trankvile endormiĝis dum tiu vintra nokto. Ŝi estis ĉiam tiel vigla, entuziasma, ridetanta, gaja, ke ni ne povis imagi ŝian subitan malaperon. Malgraŭ malbona vidkapablo, ŝi provis partopreni la E° aranĝojn ne nur en la regiono sed eĉ eksterlande. Ni vidis ŝin lastfoje en Mataró okaze de la Kataluna kongreso, al kiu ŝi estis invitita de tieaj geamikoj. Fakte ŝi havis amikojn ĉie. En tiu kongreso, ŝi partoprenis la prelegojn sur la unua vico kaj faris trafajn demandojn. Ni ne forgesos "Paŭlineto". Ŝi multe alportis al ĉiuj, ankaŭ multe faris por la progreso de Esperanto. Al ŝiaj gefiloj kaj familianoj, ni sincere kondolencas.

### ARIEGE



Oni daŭre aktivas en tiu departemento. "Le Journal de l'Ariège" aperigis tutpaĝan raporton pri la ĝenerala kunveno de la departementa asocio. La nova estraro konsistas nur ... el virinoj, tamen en la komitato estas ankaŭ viroj, inter kiuj nia amiko Jorgos. Inter la planoj por 96, ni notu projekton de aŭtobuso al Prago. Eble inter Katalunio kaj Nimo ni povus kolekti sufiĉe da partoprenantoj. De la 25a de Februaro ĝis la 3a de Marto, do dum la unua semajno de la lernejaj ferioj en nia akademio, CEEA organizas staĝon (la sepan jam). Oni povos kanti sed ankaŭ skiadi, turismi, lerni Esperanton, partopreni kulturajn vesperojn, ktp, do jen ebleco pasigi riĉigajn feriojn. Aliĝilo estas havebla de SFS aŭ de Jorgos (adreso ĉi-poste). Pro la datoj, ne prokrastu, se la ideo interresas vin.

10

Alia aktivulo en Ariège estas Christian Lavarenne; li ne nur multe vojaĝas (en 95 ĝis Hindio), sed ankaŭ eldonas du bultenojn, la unuan "Asisti", kies sekretario li estas (interreligiaj studoj), la duan "Hejmoj" (esperantaj komunumoj). Ambaŭ bultenoj estas kompreneble aboneblaj, sin turni al C.L. Foyer de culture internationale Le Presbytère O9800 Balagué (Tel: 61 04 70 66 / pĉk Marseille 6491 49 L). Plie, ne forĵetu viajn malnovajn E°-dokumentojn, gazetojn, ktp, C.L. ankaŭ volonte akceptos ilin por kompletigi ŝian bibliotekon (jam 200 diversaj esperantlingvaj periodaĵoj).

☆☆☆

# MIDI RÉGION

## Les lecteurs ont la parole

### Anglais

Midi Libre 25 septembre 1995

Montpellier, ville anglaise ?

On pourrait le croire en allant sur l'Esplanade où flottent au vent les bannières annonçant le congrès mondial de l'«International federation of fertility societies».

Bravo pour avoir réussi à faire venir cette manifestation.

Cependant, il est bien triste que les organisateurs aient cru devoir utiliser l'anglais pour annoncer la manifestation. Il n'est pas question d'avoir un comportement chauvin mais notre langue sait bien accepter les mots nouveaux pour continuer à être une langue vivante. C'est faire peu de cas de la qualité de notre langue et faire injure à tous les étrangers qui l'aiment et se font un point d'honneur de la pratiquer.

A l'avenir, j'espère que tous les congrès organisés dans les villes de la région sauront s'annoncer non seulement en anglais mais aussi en français.

G. ROUSSEAU (Montpellier)

### Défaut de langue

■ « Il y a quelques jours, dans cette même rubrique, un de vos lecteurs protestait contre le fait que les panneaux placés sur l'Esplanade pour annoncer le congrès sur la fertilité étaient rédigés uniquement en anglais. Il a mille fois raison ! Et nombreux sont les Français qui commencent à en avoir assez d'être "pris pour des Anglais". Je suggère une chose : la ville de Montpellier a eu la bonne idée de placer aux entrées de la ville des panneaux d'accueil en diverses langues. Il faudrait faire la même chose pour les congrès internationaux : des panneaux en diverses langues, comme à l'entrée de la ville. Avec en plus l'espéranto.

Les Espagnols, Italiens, Allemands et autres sont aussi respectables que les Anglais.

Il faudra bien un jour que le monde se donne une langue auxiliaire internationale. Pour le moment, cela n'existe pas. L'anglais usurpe cette fonction, cela lui permet d'assurer son hégémonie sur le monde, on l'a bien vu pour le Gatt.

Une langue "internationale" ne peut pas être "nationale". Pour l'instant, il n'existe que deux projets : l'espéranto et le latin vivant. A quand donc à Montpellier la surdouée des panneaux multilingues, y compris l'espéranto ? Une première mondiale ! Et les Japonais seraient peut-être intéressés ... »

P.M. (Saint-Jean-de-Védas)

### Espéranto

Midi Libre / 21 Novembre 95

Le correspondant new-yorkais d'un grand quotidien parisien rapportait récemment qu'un fonctionnaire français de l'Organisation des nations unies allait jusqu'à dire : « A l'ONU, pour faire carrière, on se tait et on travaille en anglais comme tout le monde », ajoutant même que « le bilinguisme est une vaste plaisanterie ». Le temps des désillusions est donc passé. Et que dire du gavage linguistique imposé à la jeunesse alors que l'illettrisme prend des proportions préoccupantes ? Le processus de laminage des langues et cultures est bien engagé. Mais les anglophones ne sont pas les seuls responsables de cette situation. De Gaulle ne se serait jamais incliné à parler en anglais dans une interview donnée à une chaîne américaine. (...)

En tant que coauteur de *L'Homme qui a défié Babel* avec un ancien rédacteur en chef de l'Agence France presse, René Centassi, j'estime que l'espéranto peut effectivement rétablir l'équilibre entre langues et cultures. Le fait de pouvoir consacrer de huit à dix fois moins de temps à son enseignement qu'à celui de l'anglais, libérerait des moyens humains, matériels et financiers pour les autres langues, y compris pour le français et la lutte contre l'illettrisme.

Henri MASSON (85-Moutiers-les-Mauxfaits)

Francophone de Flandres, je me demande à quoi cela peut-il encore bien servir de vouloir assurer la survie du français dans le nord de la Belgique alors que, dans l'hexagone, l'on baisse servilement sa culotte devant l'« english ». Aussi suis-je parfaitement d'accord avec votre lecteur qui, dans une chronique récente, préconise l'emploi de l'espéranto comme langue supranationale.

C'est d'ailleurs une idée qui fait son chemin parmi les euro-parlementaires.

Germain PIRLOT (Ostende-Belgique)

*Niajn dankojn al J. Bès, kiu sekve de la alvoko en la lasta SFS, retrovis la artikolojn pri Montpellier kaj la angla lingvo (maldekstre) kaj ebligas al vi ilin legi. Gratulojn al "P.M." ! Pri la leteroj dekstre, vi eble scias, ke H. Masson estas sekretario de Sat-Amikaro kaj kunaŭtoro de la nova libro pri la vivo de Zamenhof (vidu SFS 134, frontpaĝo). G. PirLOT estas ankau E°-aktivulo, internacie konata.*

*La tagon post Kristnasko, kelkaj miloj da Montpellieraj legantoj certe miris kiam ili legis la vorton "esperanto" frontpaĝe.*

*Espereble ili atente legis la artikolon interne ! Gratulojn al la ĵurnalistino kaj la intervjuitoj !*

Midi Libre 23 octobre 1995

## MONTPELLIER: LE MONDE MÉCONNU DE L'ESPERANTO

Page  
Montpellier

14.90€ L'ESPÉRANTO

GRAND QUOTIDIEN D'INFORMATION DU MIDI

13.90€ L'ESPÉRANTO

Acteur et chanteur

**Dean Martin  
s'est éteint  
à Beverly Hills**

► Informations générales, page 17

# Midi Libre

MONTPELLIER

**afer**  
CORRESPONDANT  
Paul DUBOIS  
CORRESPONDANT AGRÉÉ  
AGENT ABELLE-VIE  
13, place de la Comédie  
Montpellier  
67.58.44.04

TAUX NET  
1994

**7,72%**

# L'espéranto n'a pas dit son dernier mot.

*La langue internationale inspire la communication. Les frontières se tissent. Histoire de Suzanne et Léo.*

■ Léo Lentaigne a débarqué à Montpellier au début des années 30 avec son paquetage de caporal. Pour occuper son temps, le jeune gradé rendait visite aux soldats hospitalisés. Un jour, sur la table de chevet d'un militaire blessé, il découvre un livre « *ni en Français, ni en Espagnol* ». Curieux, il emprunte le bouquin... et se « *plonge littéralement dans le décryptage de cette nouvelle langue : l'espéranto* ». Très vite, Léo se passionne. Sans l'aide de personne, il apprend les subtilités de ce moyen de communication universel.

Bien des années plus tard, sur les bords du Lez, la jeune Suzanne découvre l'espéranto en discutant avec l'ouvrier d'une tannerie. Les perspectives d'ouverture sur le monde extérieur la surprennent. « *Pouvoir correspondre, sans barrière de langage, avec des Japonais, des Brésiliens et des Russes est extraordinaire* ». Suzanne étudie l'espéranto et... voyage.

Lors d'une virée espérantiste en Autriche, elle rencontre Léo, devenu institu-

teur. Par le biais de leur passion linguistique, le couple devient complice, et les deux espérantistes s'unissent pour la vie.

## Avant tout, communiquer !

Des histoires d'amour et d'amitié en espéranto « *il y en a plein* », remarque Léo, photos d'amis à l'appui. « *Pour le congrès de Séoul, nous nous sommes retrouvés entre correspondants. Imaginez : un Japonais, un Israélien, un Pakistanais et moi, le Français. Et bien, on se comprenait et s'entendait tous !* » Les discussions sont colorées, les idées s'échangent sans baffouillages ni contresens.

Les anecdotes entre pratiquants foisonnent aussi. « *Car je ne sais combien de fois, grâce à notre emblème, une étoile verte, j'ai rencontré des étrangers en vacances* », apprécie le vieux monsieur en montrant son badge. Jeanne Bony et Micheline May, deux Montpelliéraines pratiquantes, d'ajouter : « *nous, nous avons mis des autocollants sur notre véhicule* ». Comme Léo, Suzanne ou Louis Ensuque, le secrétaire du centre d'Espéranto montpelliérain, ces linguistes ont tissé d'étroits rapports avec des habitants de tous les continents. « *Des gens que nous n'aurions certainement pas pu rencontrer sans l'usage de cette langue commune* ».

## Traduction et diffusion

Bien entendu, étudier et pratiquer sont les deux règles inébranlables de la connaissance d'une langue quelle qu'elle soit. Et l'espéranto ne déroge pas à la règle. Mais, « *la logique des constructions, la simplicité des tournures font qu'elle s'imprègne facilement et s'ancre au fil des ans* ».

Pour s'exercer, les pratiquants ont à leur portée de multiples publications : méthode Assimil, BTJ, traductions d'ouvrages de tous les



Suzanne et Léo Lentaigne, Louis Ensuque, Micheline May et Je

pays, dont la Scandinavie qui a fait encrer en espéranto des auteurs juste traduits aujourd'hui en français. Des fascicules, tels des guides touristiques sont aujourd'hui

disponibles en langue universelle dans certaines villes ; des journaux sont diffusés, de tous types, dont des satiriques. Et même « *les Verts* » l'emploient lors de leurs

## Où l'apprendre sur le Clapas ?

Centre culturel Espéranto de Montpellier : 5 rue du docteur Roux, Montpellier. Tél. 67.54.15.43.

Adhésion : 100 F/an. Trentaine d'adhérents passionnés.

Présidente, Yvette Vierne. Réunion le premier mercredi de mois, 18 h, Centre social de la CAF, 410 av de Barcelone, Montpellier.

Cours : université du tiers-temps et Maison pour tous Joseph-Ricome (vendredi, 18 h-19 h), 7 rue Pagès.

Initiation : samedi 16 décembre, MPT J. Ricome, 14 h-16 h.

Enseignement de l'espéranto dans le scolaire et l'universitaire à Clermont-Ferrand, Aix-en-Provence, Paris, Rennes.

## A travers le temps

L'espéranto ? Il est reconnu comme "fait social" par l'UNESCO depuis 1954 et inclus depuis 1994 parmi les messages "Urbi et orbi" adressé par le Pape Jean-Paul II aux fidèles à l'occasion des fêtes de Noël et de Pâques.

Cette langue universelle est pratiquée et enseignée dans cent pays différents.


A première vue, l'espéranto sonne comme une langue européenne. Dans la formation des mots, des comparaisons sont possibles avec le chinois. La notion grammaticale comprend des essences slaves.

1887 : première édition de "Lingvo internacia" : 40 pages. 917 radicaux, quinzaine d'affixes (sur et préfixes), 16 règles de grammaire sans exception, alphabet de 28 lettres.



# encore

tion. Des liens sans  
Témoignages d'espoirs



annine Bony, tous pour l'Espéranto.

Photo Jean-Michel MART

congrès », précise Jeannine Bony.

Certes, face à l'Anglais, l'espéranto semble bien faible. « Mais, les grandes idées mettent deux à trois cents ans avant d'émerger », rappelle Léo qui ne doute pas « qu'un jour, en désespoir de cause, les hommes de l'an 2 300 re-

trouveront avec joie dans le fond des tiroirs la fameuse langue universelle imaginée par un illustre inconnu » (voir par ailleurs). Car foi d'adeptes, l'espéranto n'a pas dit son dernier mot...

Camille-Solveig FOL



## La compréhension pour l'entente

■ La Genèse raconte que pour punir les hommes de leur orgueil, Yahvé a mis le désordre dans leur langage. Depuis, ils ne s'entendent plus les uns les autres.

Cette parole, le jeune Lejzer Zamenhof, fils d'instituteur, décide de la contredire aux vus et sus des mésententes qu'il constate autour de lui. Car, l'enfant est né à Bialystok (nord-est de la Pologne), dans une ville exemplaire au niveau des disparités linguistiques. Les 30 000 habitants y vivent dans un climat d'hostilité chronique depuis des lustres. Cinq langues y sont parlées, frontières invisibles mais infranchissables entre les communautés russes, polonaises, biélorusses, allemandes et yiddish.

Polyglotte précoce, Lejzer prend conscience de l'impossible entente entre des voisins qui ne parlent pas le même langage. Imposer une langue, c'est alimenter encore plus les haines. En inventer une, "internationale", est la seule solution plausible.

Adolescent, il planche sur les bases d'une nouvelle langue. Une activité en dilettante qui se transforme en passionnantes recherches et tangibles constructions.

En décembre 1878, lors de sa dix-neuvième année, Lejzer se fait rebaptiser Ludwik et présente à ses proches les racines de la "Lingvo internacia". Sous le pseudonyme de "docteur Espéranto" (celui qui espère), il fait publier son premier ouvrage présentant les seize règles de grammaire sans exception, et l'alphabet de 28 lettres en 1887.


En 1891, la méthode est diffusée en quinze langues... en 1905 s'ouvre le premier congrès universel de l'espéranto comptant 688 participants représentant 20 pays différents et historique car premier colloque sans interprète.

Prometteur, l'espéranto n'a pas eu pourtant le devenir escompté. Si l'usage de cette langue s'est développée jusqu'en 1914, la Grande-Guerre l'a fauchée en pleine expansion.

Lejzer Ludwik Zamenhof ne verra pas l'issue du conflit mondial, il succombera des suites d'une angine de poitrine en avril 1917.

L'espéranto, lui, reprendra force comme le Phœnix pour aujourd'hui compter des adeptes dans le monde entier et continuer à se développer.

Ludwik Lejzer Zamenhof (15.XII.1859-14.IV.1917)  
Initiateur de l'espéranto (celui qui espère). Polonais, ophtalmologue.  
"L'homme qui a délié Babel", René Centassi et Henri Masson, édition Ramsay, 400 pages, 139 F.



Dans une centaine de pays les défenseurs utilisent le dictionnaire de l'espéranto.

1891 : traduction de l'ouvrage en 15 langues.  
Août 1905 : premier congrès mondial de l'espéranto à Boulogne-sur-mer. 688 participants, 20 pays représentés. Jusqu'en 1913, les congrès nationaux se succèdent : Genève, Cambridge, Dresde, Barcelone, Washington, Anvers, Cracovie, Berne.

En 1914, rendez-vous est donné à Paris. 3 739 congressistes sont inscrits. La Première guerre mondiale coupe la parole aux espérantistes.

Dernier congrès : Tampere (Finlande) en 1995, 2 400 participants, 70 pays différents.

# ARIEGE stage

## CHORAL et ESPERANTO

### Ni kantu kune

De la 25-a de februaro ĝis la 3-a de marto '96 okazos 7-a Esperanto-koruso-staĝo en La Frechède - Montferrier, Francio.



En la programo: ĉiutaga korusado sub gvidado de Zdravka Bojčeva el Bulgario, korusestrino, TEJO-estraranino (trejnigo el verkoj tradiciaj, klasikaj, modernaj kaj originalaj). Krome - skiado, E-instruado por komencantoj, ekskursoj, ludoj...

Kotizoj (ne inkl. restadon): depende de la aĝo kaj tempo de aliĝo - inter 80 kaj 400 FRF.

Plia informo, aliĝoj ĉe:

Jorgos, F-09120 St Félix, Francio

## PROGRAMME

Chaque jour de 9 heures à midi et de 17 à 19 heures:

### CHANT CHORAL


sous la direction de

M<sup>lle</sup> Zdravka BOJČEVA, chef de cœur bulgare, avec des œuvres traditionnelles, classiques, modernes et originales.

Les après-midi seront réservées au ski de fond, à l'étude de l'Espéranto ou à des visites touristiques et culturelles.

Les soirées seront réservées aux jeux à la détente, aux débats et aux échanges avec d'autres chorales locales.

N.B. : Si des stagiaires non-choristes assez nombreux s'annoncent, nous organiserons des cours et jeux aux heures "chant".



## BULLETTIN D'INSCRIPTION

à retourner à Georges COMTE  
09120 St FÉLIX- Rf

Prénom .....  
Nom .....  
Date de naissance : .....  
Adresse .....  
C.P. .... Ville.....  
Pays ..... Téléphone.....  
Profession .....  
Voix : ♀ S  A  ♂ T  B   
Je réserve ..... chambre avec lit à 2 places  
lits 1 place en chambre à 2-4 lits

### Tarifs d'inscription (sans hébergement)

	jusqu'à → 15-01-96	ensuite
< 15 ans ou 3e d'une famille participante	160 FF	240 FF
de 15 à 26 ans ou 2e d'une même famille	240 FF	320 FF
> 26 ans	320 FF	400 FF

Règlement à l'ordre de :

ESPERANTO CCP 2579 34 E TOULOUSE

Je verse ..... FF d'adhésion

+ ..... FF d'arthes (minimum 500 FF)

pour repas et hébergement (total 1200 à 1550 FF)

signature :

## KATALUNIO

Ne estas facile raporti en kelkaj linioj pri la Kataluna Kongreso de Mataró, pri kies programo vi legis en la lasta SFS. Partoprenis proksimume 110 personoj. Deko da federacianoj (el Nîmes, Montpellier, Béziers, La Canourgue, Perpignan) partoprenis ĝin. La programo estis plenplena. La prelegoj -ĉu en la kataluna, ĉu en la esperanta - estis ĝenerale bonkvalitaj. La artaj vesperoj estis variaj kaj interesaj, ni citu la madridan poeton Miguel Fernández, la francan kanzoniston Jak Le Puil, la koruson "Primavera per la Pau", koncerton de tradicia muziko; ni ne forgesos literaturan matenon, emociigan omaĝon al Salvador Guma, doĵeno (93-jara) de la asocio kaj brilan adiaŭan bankedon. Entute, tiuj el ni, kiuj partoprenis, ne bedaŭris. Post la kongresoj de Lunel kaj de Mataró, ŝajnas, ke nova kunlaborado eblos. Ni jam rendezuis por la venontaj jaroj, sed informos vin nur poste.

Alia kongreso disvolviĝis en Katalunio kelkajn semajnojn poste. Temas pri la Hispana Kongreso, kiun partoprenis 130 personoj en la turisma urbeto Salou. Je tiu okazo oni inaŭguris E°-straton.

☆☆☆

## PROVENC

**Rendezuoj** (pri ĉiuj rendezuoj, detaloj aŭ aliĝiloj estas haveblaj de SFS)

**Printempa staĝo** la 16an kaj 17an de Marto apud Apt, trinivelaj kursoj (tuta restado: inter 320 kaj 350F + aliĝkotizo 20F). Informas: Provence E° BP 136 84204 Carpentras Cedex

**Provenca kongreso**: la 4an kaj 5an de Majo (samkiel la nia) en La Baume lès Aix

Respondekas: Daniel Moirand 18 bis, Rue du M-al Joffre 13100 Aix en Provence (42 38 52 03)

☆☆☆

## TOULOUSE

Kiel ĉiujare la grupo sin manifestis por la "Ago-Tago" (vidu la raporton sur la paĝo 11).

"La Krokodil", redaktita de Ges. Cash (1 Place des Avions 31400 Toulouse) aperas nun 5foje jare. Manĝo-klaĉoj antaŭviditaj la 2an de Februaro, 15an de Marto, 5an de Aprilo, 3an de Majo.

Saft ĉe Floréal Martorell Eurokka 31450 Donneville (Tel/Faks 61 81 95 65) organizas **turneon** de

Ĵak Yvart de la 18a ĝis la 26a de Majo. Ĵak Yvart kantas franclingve poemojn de Brassens, Giono, Ferré pri mondpaco kaj frateco sed ankaŭ siajn proprajn en la franca kaj esperanto. Partopreno de

ĉiu invitanta grupo: 1650F al la artisto + vojaĝkostoj. La turneo estas verŝajne jam preta (aŭ nuligita). Se la turneo (aŭ venonta) interesas vian grupon, vi povas tamen kontakti "Flo".

☆☆☆

### Ago-Tago en Toulouse

La tutmonda Ago-Tago por E-o celebriĝis, kiel kutime, ankaŭ en Toulouse. Matene sur la ĉefa placo "capitole" e-istoj disdonis flugfoliojn pri E-o.

Posttagmeze sur la sama placo, antaŭ la urbodomo, tabulo kaj du tabloj, kovritaj de libroj kaj broŝuroj, informis la publikon pri nia lingvo kiel solvo de la lingvo-komunika problemoj.

Inter aliaj libroj elstaris franclingva biografio de Zamenhof, ĵus eldonita de ko-



nata eldonejo Ramsay, "La homo, kiu de-finis Babelon". Gian aŭtoron, René Centassi, eks-ĉefredaktoron de AFP (ĉefa franca informagentejo) ni planas baldaŭ inviti por prezenti sian verkon en nia urbo.

Multaj estis la interpasantoj en ĉi tiu suna posttagmezo, kaj ni diskutis kun ili, kolektinte adresojn de interesuloj.

Pri ĉi tiu rendezvuo kun la publiko estis dediĉita gazetartikolo en la Depeche, kiu ankaŭ anoncis la aperon de la Zamenhof-biografio kaj komencon de niaj E-kursoj.

Esperanto-Kultur-Centro, Toulouse

**Humuro aŭ Humoro?** "Mondhejmo" baldaŭ malaperos kaj ni tion bedaŭras. Ni ricevis de (germanaj) kontraŭstarantoj de la decido laŭdire humurajn kovertojn. Ni ne aperigos aliajn kaj dubas pri la utileco de tiaj skribaĵoj...

El la serio:  
"Famkonataj diraĵoj  
de famkonataj esperantistoj"

ESPERANTA VERBO  
(Multigo kaj distarigo amuzataj)

**MONDHEJMO**

Ekologia Centro Internacia

Mi ne volas florojn sur mia tombaŭ  
aŭ en iu ajn imaga paradizo,  
sed dum mia vivo  
kaj sur nia planedo.

*Justo*  
alias Akiles Sanz,  
ŝtelpetanto kaj petŝtelisto  
de Mondhejmo, Ekologia Centro  
Internacia kun Esperanto  
kiel oficiala lingvo

kaj:  
Mi nun volas perei  
kiel meta kolbaseto,  
ĵetita en la ĝardenon  
de mia paradizo  
kaj forvorata de la katoj  
de mia tomba najbaro.  
Bv. ankaŭ ĉifoje neniam florojn!

SENPAGE OKAZE DE KRISTNASKO 1995!

**INVITO**  
al la dumtutjara unuaktora prezentaĵo

**"DE EREMITO AL HERMETIKULO"**

en la Maison Esperanto/Cauduro,  
FR-34360 St. Chinian, Francio

Oni rigardas kaj aŭskultas eksan eremiton kaj lian multfojan transformadon en hermetikulon. Hermetikulo je sia plej bono! Li donas lekciojn kiel efektiviĝi aŭtokratan reĝimon en la famkonata ladskatolo "Mondhejmo", kiu kutime, ĝuste kiel ĉiu konservujo, estas malfermita en nur unu flanko. La hermetikulo montras klamaniere labori per lavtuko kaj neceseja broso, kaj kiel bani la testikojn en hazardaj flakoj sur la grundo de la banejo. Li ĉirkaŭiras kun ŝlosilo en unu mano kaj liro en la alia. Efektive, la ŝlosomano estas la centra rekonilo de lia vertikala kvazaŭ katolika kontrolismo. La liro ŝajniĝas plezurigan akceptemon. Sed la mizeraj allogitoj apenaŭ eniris la konservujon, kiam ili estas submetitaj al la rigora fundamentismo de la hermetikulo: Do, pli bone resti ekstere kaj aplaudi. Krom tio oni kompreneble rajtas ĵeti frandaĵojn al la hermetikulo trans la limojn de la konservujo: nuksojn, vinberojn kaj kuketojn, eĉ anasojn kaj malmultekostan vinon. Ne hezitu! Permesu al vi ekscii pli multe pri la eremito, kiu fariĝis hermetikulo. Bonvenon al la Maison!

**ABSOLUTE SENKOSTA!**

### LASTAJ INFORMOJ:

#### +Aperos (eble) venontfoje...

La komunista grupo de la Nacia Asembleo pretigis dokumenton cele al leĝpropono por la instruado de esperanto en la unua- kaj dua-gradaj lernejoj en F. Ĉu ĝi estos pli sukcesa ol antaŭaj leĝproponoj?

\*\*\*\*\*  
Eŭrodeputitoj (vidu SFS 134 p.12) : respondis pozitive pri la uzo de esperanto (je la dato de la 15a de Januaro)

5 Francoj (J-P. Bebear UDF/PR - P. Bernard-Reymond UDF/CDS - G. De Bremont d'Ars UDF/Clubs P et R - J-F. Hory ER - G. Moreau PCF); ankaŭ 13 Belgoj, 13 Britoj, 11 Irlandanoj, 3 Italoj. Peticio 5paĝa, redaktita de C. Piron, al la Eŭropa Parlamento por la uzo de E° atendas vin kontraŭ afrankita koverto ĉe Raymond Boré 481 Square Zamenhof, 73000 Chambéry.

\*\*\*\*\*  
En la venonta bulteno aŭ iu el la venontaj vi povos legi artikolojn pri : \* la lingva politiko en F \* ĉu morgaŭ la ĉina ? \* staĝoj kaj staĝejoj en 96 \* automataj tradukiloj \* Novaj Asteriks-albumoj \* Prago \* Federacia kongreso \* Argumentoj pri kaj por E° \* Videofilmoj en E° \* E°vinoj \* Niaj Prezidentoj kaj E° \* Mondanistaj Militantoj. Kompreneble vi povas ankaŭ proponi aliajn temojn. Ne forgesu redakti en E° (eĉ se korektoj estas necesaj) kaj sendi legeblajn tekstojn. Antaŭdankas la redaktoro.



*... kaj post finlegado de via bulteno, ne forgesu reaboni !*

**Après avoir lu ce numéro, n'oubliez pas de vous réabonner, si vous êtes satisfait...**

(si vous ne l'êtes pas, vous pouvez aussi nous le faire savoir).



# VOJAGO AL SUDA AMERIKO



## En Peruo : la flosantaj insuloj

Dum Novembro mi partoprenis organizitan vojaĝon al Peruo, kaj iris ĝis Puno, urbo laŭborde de la lago Titikaka. Tiu lago, la plej alta navi-gebla en la mondo, je 3812 metroj super la marnivelo, kaj larĝa je pli ol 8000 kvadratkilometroj, havas en Peruo malgrandan parton duon-fermata per du peruaj duoninsuloj. Tie oni povas viziti la tiel nomatajn flosantajn insulojn.

El Puno ni foriris per ŝipeto laŭlonge de la lagbordo, kie kreskas sur granda surfaco en la akvo altaj kanoj . Per tiuj kanoj la Indianoj, tie nomataj "Uros", konstruis siajn flosantajn insulojn. Ni navigis sur blua kvieta akvo, sen la plej eta ondo, sub varma suno en tiu printempa periodo kaj jen la unua grizflava insulo sur kiun ni elsipigas.

Stranga insulo ! Ĉio estas el kanoj : la grundo, la domoj, muroj, tegmentoj, pordoj. Ni marŝas sur kanoj, kelkaj ankoraŭ verdaj, sed sur tapiŝo dika je unu aŭ du metroj, ĉar tretita de multaj generacioj. Kelkaj rondaj kabanaj kun pinta tegmento havas nur kanan garbon kiel pordon. Aliaj estas tre belaj kun arte plektitaj muroj kaj tegmentoj, eĉ kun fenestro kaj bele plektita pordo. Sed oni uzas ilin preskaŭ nur por dormi.

Ĉiuj homoj vivas ekstere, sed ni vidas preskaŭ nur virinojn kaj infanojn, ĉar la viroj fiŝkaptas aŭ ĉasas sur la lago, aŭ eble por kelkaj laboras en Puno. Ni devas priatenti ne piedpremi la sekiĝantajn sub la sunradiaj fiŝojn kaj birdojn kun eligita interno. Iuj virinoj ŝpinas, (ĉu ŝafa aŭ alpaklano ?), aliaj trikas, aliaj pretigas la manĝon sur ligna fajreto tere sur fera plato, ĉiuj vestitaj per diverskoloraj refalditaj juĝoj kun buntaj korsaĵoj. La felta ĉapelo de la Altiplano ombra iliajn flavbrunajn iom faltitajn vizaĝojn. Infanoj ludas per ŝtonetoj aŭ postkuras sin, iu bebo dormas ĉe ombro, knabino kun longaj brunaj harplektaĵoj portas surdorse sian frat(in)eton en bunta striita kovrilo nodita sur la maldekstra ŝultro. Knabeto rigardas nin, faras kelkajn komikajn saltetojn kaj almozpetas moneron. Alia, por la sama atingiĝo, signas al ni, ke ni fotu lin.

Ni piediras ĝis alia insuleto, ligita al la unua per ponteto formalaperinta sub la kana tavolo. Tie ni vidas elementan lernejon, bunte koloritan, kun nur unu ĉambro malplena, kaj aeran muzeon kun pajloŝtopitaj birdoj. Hundoj kaj kokinoj promenas, porko gruntas sub kana tegmento, kaj en ĝarde-neto unu metron larĝa kreskas kelkaj cepoj kaj 2 floroj. Iom mirinda, ĉu ne ? Sed dum la jarcentoj amasiĝis ĉiuj rubaĵoj de homoj kaj bestoj, kaj hodiaŭ mi povus eltiri el sub la kanoj fruktodonan teron por mia ĝardeno...

Por iri de iu insulo al alia, aŭ ĝis la urbo aŭ la montoj, la Indianoj uzas beletajn kanuojn pintajn ĉe ambaŭ ekstremaĵoj, arte faritajn el tri faskoj da kano fortike ligitaj, tre stabilaj sur la kvieta akvo de la lago. Eĉ infanetoj pagajas trankvile sur ili. Bedaŭrinde ili ne daŭras longe, ĉar ili putriĝas en la akvo kaj oni devas ĉiujare konstrui aliajn.

Ni ĉiuj adiaŭis kun bedaŭro tiujn ne ordinarajn sed tre ĉarmajn insulojn.

## En SETE, la Internacia Semajno

M.M.

Unufoje tiun somerfinon mi partoprenis kun mia familio en la Internacia Semajno en Sète. Malgraŭ vetero escepte malvarmeta por la sezono, ĉiuj ĝuis la agrablan etoson kaj de E-a komunumeto, kaj de loko rimarkinde kuŝanta sur la kornico de fama mediteranea urbeto, ŝirmata de belaj pinoj kaj karesata de virinecaj marondoj. Mi ne revenos al la jam sufiĉe kompleta "faka" priskribo far du lokaj gazetoj "La Marseillaise" kaj "Le journal de l'Ariège", kiujn vi legis en la antaŭa SFS; mi nur aldonos kelkajn proprajn vespermemojn...

Gaja estis tiu kvizo, "kiel dum la U.K-oj", iom senorde sed tiom simpatie preparita kaj prezentita de Marija, dum kiu tri erudiciaj teamoj finis konkurson per po unu tre, oni diru, malsimila ĥoro ! Franda tiu nun ĉiufoje atendata sardinumado kun babiligaj regionaj vinoj. Emociaj, korŝiraj tiuj kelkaj diapozitivaj pri domoj detruitaj, ruinoj pli kaj pli similaj en ĥaosaj pejzaĝoj de Kroatio nenii-gita de la rabia homa frenezo, kiu, se mi bone komprenis, eĉ ne indulgis la fratajn esperantistojn transe de la freŝaj limoj ! Reviga kaj agrable pedagogia la vojaĝo tra la Boromeaj Insuloj dank'al la ridete afabla Mario. Kutima kaj alloga la prezento de la lasta UK en Tempereo far hispana kataluno. Distraj la ŝkeĉoj luditaj de nia fama triopo. Instruaj kaj prelegecaj la prezentoj de la nederlanda E-a klubeto de Terneuzen (pliagrabiligita per disdono de tradiciaj bombonoj) kaj de la E-aj Centroj en la mondo far respektive emeritiĝinta ŝuvendisto kaj nia nelacigebla kaj kompetenta Jorgos. Konklude mi volas reliefigi eventon tute ne priparolitan en la lasta SFS. Nome okazis fine de la semajno internaciaj ekzamenoj je la respondeco de Marija, sekretariino de ILEI, kiujn sukcese trapasis kvar staĝanoj (unu la bazan, tri la mezan).

B. Berthonneau



## ESPERANTO KAJ FILATELO:

De oktobro 1978 ĝis januaro 91 aperis en "La philatélie française", oficiala organo de la Franca Federacio de Filatelaj Asocioj, 64 franclingvaj kronikoj de Jean Amoureux pri esperanto kaj filatelo. Poste, sub nova formo, kun propra titolo kaj koloraj ilustraĵoj, aperis ĝis 1995 entute 12 artikoloj, kelkfoje plurpaĝaj. Lastperiode ne aperis senditaj artikoloj...

De kiam mortis Jack-André Rousseau, vakis lia kroniko en "L'écho de la timbrologie", ĉiumonata eldonaĵo de la renoma poŝtmarkokatalogo "Yvert et Tellier". La redakcio konsentis pri ĉiumonata kolorilustrita artikolo de J.A. Jen la unuaj rezultoj por novembro 95, decembro 95 kaj januaro 96. Gratulojn al nia amiko !

### STYLISÉ

Plus de 2400 participants originaires de 78 pays ont assisté au 80<sup>e</sup> congrès universel d'espéranto qui s'est tenu du 22 au 29 juillet dernier à Tampere (Finlande). Les 27 et 28, un bureau temporaire s'est tenu dans l'enceinte du Palais des congrès et utilisait un cachet avec un texte en espéranto. Outre une étoile à cinq branches, il représentait une évocation stylisée du Palais des congrès dont la construction a été terminée en 1990. Pendant toute la durée du congrès, une boîte à lettres spéciale recueillait le courrier.

(Renseignements fournis par M. Jean Amoureux)

### CHEMINOTS ESPÉRANTOPHONES


Le 47<sup>e</sup> congrès international des cheminots espérantistes s'est tenu à Pécs (Hongrie) du 20 au 26 mai dernier. Il a été gratifié d'un entier postal commémoratif, d'un cachet postal mis en service à Budapest et d'un cachet temporaire utilisé à Pécs pendant la durée du congrès.

Sur l'entier, le timbre à 14 florins est bilingue et, par l'étoile verte à cinq branches, symbolise l'universalité de la langue sur un fond de planisphère. A gauche, la silhouette de la cathédrale de Pécs est surmontée du logo du congrès. L'oblitération de Budapest a un diamètre de 30 mm. Elle est complétée par la date traditionnellement en quatre langues : français, anglais, russe et hongrois. Le cachet de Pécs est légèrement plus petit (28 mm) et, hormis le nom de la ville, la présentation est la même (texte en hongrois). Dans les deux cas, l'illustration représente l'insigne des cheminots espérantophones. Leur fédération internationale, I.F.E.F. (Internacia Fervojojista Esperanto Federacio) est affiliée à la F.I.S.A.I.C. (Fédération internationale des sociétés artistiques et intellectuelles des cheminots).

### LES J.O. À PÉKIN ?

En 1993, la ville de Pékin et donc la Chine, avaient fait acte de candidature pour accueillir les Jeux Olympiques de l'an 2000. Une façon de se positionner à l'approche du troisième millénaire... Mais c'est Melbourne qui a été choisie. Témoin philatélique de cette espérance déçue, un cachet a été émis dès septembre 1993. Bilingue, en chinois et en langue internationale espéranto, le texte l'affirme : "Les 18<sup>e</sup> Jeux Olympiques auront lieu à Pékin en l'an 2000". Le même texte est repris sur l'enveloppe commémorative. Comme quoi la méthode Coué ne marche pas à tous les coups !


(Renseignements fournis par Jean Amoureux)



### Tria longstampo:

Tria longstampo "Mi estas dulingva..." estas uzata ekde la 6a de Januaro 96 en Amiens (ĝis la komenco de Aprilo). Tiuj, kiuj deziras ricevi tian stampon, povas sendi afrankita(j)n koverto(j)n aŭ poŝtkarto(j)n kun propra adreso aŭ la adreso de amik(in)o en afrankita koverto adresita al : Groupement postal des Hortillons, BP 1022, 80010 Amiens Cedex 1.

Informis R. Boré.



**Santunoj:** Ni salutu la jarfinan eldonon de tuta serio da poŝtmarkoj pri santunoj, tiuj kristnaskaj kripfiguroj famkonataj en nia regiono kaj apuda Provenco.



# DISTRA PAĜO

## KRUCVORTOJ

I										
II				■				■		
III										
IV				■					■	
V								■		
VI					■					
VII				■						
VIII			■					■		
IX				■			■			
X										
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

### Horizontale

- I) Fakultativig(a).
- II) Konservfoli(o) / Skrapvund(o) / 2 el 5 ; aŭ 15.
- III) Cezaro, Pompeo kaj alia.
- IV) s : Homa meteo / Biblia frato.
- V) E-a ĉefurb(o).
- VI) Malordita SAT-ano / Korolpart(o).
- VII) Sangovojeg(o) / Klaŭnĉap(o).
- VIII) s : Virnomo / Vojaĝer(o) / s : Kelke da soldatoj.
- IX) Iamaniere / s : Haŭtotruo / Monprofit(o).
- X) Salatherb(o).

### Vertikale


- 1) Nepra aŭ(o).
- 2) Sanga nokto.
- 3) Perfidul(oj) / s : Herbaĉo.
- 4) Kruda te(o), eble.
- 5) Bonodora marĉflor(o) / s : Hakilo.
- 6) Daŭra elrealiĝ(o) / Tru(o) en la krono.
- 7) Efiki per reflektado sur lumradiojn de malsupre supren.
- 8) Verk(o) / Duonanao.
- 9) Gas(o) / Klasa adverbo.
- 10) Post sekundono / Ovoluj(o).

s : sone

B. BERTHONNEAU.

### Solvoj de la 134a:

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	B	I	B	L	I	O	T	E	K	O
II	E	M	■	K	U	M	U	L	U	S
III	L	P	P	■	J	A	C	I	N	T
IV	E	L	A	P	■	R	I	Z	E	R
V	R	I	D	I	G	■	D	I	G	O
VI	O	K	U	L	A	R	I	■	U	G
VII	F	I	L	■	F	A	D	E	N	U
VIII	O	■	E	R	■	B	■	D	D	T
IX	N	O	V	E	M	B	R	E	■	O
X	O	R	G	A	N	I	S	M	O	J



El "Eventoj"

## INSULTOJ

"INSULTOJ estas vortoj, uzeblaj por ofende alparoli homon aŭ ofende priskribi ajon aŭ situacion" (R. Corsetti). Jen kelkaj insultoj, kiujn vi povus uzi en viaj ĉiutagaj disputoj aŭ en viaj beletraĵverkoj (en krampoj estas preciziga informo):

aĉulo, fiaĉulo, fi-homo (kontraŭ homo pro fizika aŭ morala malboneco), arogantulo (pro troa memfido), azeno, fojnkapulo, kreteno, malsaĝulo, ŝencerbulo, stultulo, ŝtupo (pro stulteco), babilulo (pro troa parolemo), bandito (pro rabemo, eksterlegaj agoj), besto (pro krudeco, malklereco, stulteco), bird-timigilo (pro ĝeneco, tedemo, malbelega aspekto), bruto (pro krueleco), ĉarlatano (pro trompado de la publiko), ĉiesulino, putino (kontraŭ virino pro malmorala konduto), faŝisto (pro reakciaj politikaj ideoj), fi-lerculo (pro trompemo), fiulo (pro fia konduto), frenzulo (pro neracio), fripono (pro ruza trompemo, malico), fuŝulo, sentaŭgulo (pro malkapablo), huligano (pro kontraŭsocia konduto), hundaĉo (pro fienco), kanajlo (pro malnobla friponeco), klaĉulo (pro disbabilado pri aliaj homoj), monstro (pro malbeleco, krueleco), murdisto (pro krueleco, krimeco), naŭzulo (pro naŭzeco), parazito (pro paraziteco, fienco), rabisto (pro krimaj agoj), ruzulo (pro ruza elturniĝemo), serpento (pro malico, perfidemo), ŝovinisto (pro troa glorado de sia popolo), volapugisto (ŝerca insulto kontraŭ homo pro ties stulteco, kombino de volapukisto kaj pugo).



Nu jen, vi (post kelka praktiko, certe) fariĝos fakulo pri insultoj. Se, tamen, ili al vi ne sufiĉas aŭ estas tro (mal)molaj, vi povas fantazii kaj elpensi novajn insultojn aŭ uzi la universon vorton "zozo". Kaj tute certe, mi alvokas neniun ĉie kaj ĉiam uzi la vortojn/esprimojn, des pli kiam la situacio ne postulas tion.

Feliĉan blasfemadon!!!

El libro de B.Kolker "Vojaĝo en Esperantlando" - Moskvo, 1992, pp. 220-221.

Por la venonta numero de "Sudfrancia Stelo" bonvolu respekti la daton de la 30a de Marto.


✉ SFS de Jean Hénin, Beuregard, Route de Montcayrroux 48500 La Canourgue

☎ 66 32 86 36 (ankaŭ faksilo)

Anticipan dankon!

☆☆☆☆☆

# Internacia Semajno



ĉe mediteraneo



22-a INTERNACIA ESPERANTA SEMAJNO

Ĝi okazos de lundo la 9-a de septembro ĝis la 16-a de septembro  
en la sama loko: Maison familiale "Le Lazaret" en SETE (34200)

La aliĝkotiĝo por unu persono estas :  
250 FF ĝis la 1-a de junio  
350 FF poste

La loĝado ( kun la tri manĝoj ) en la feriejo " Le Lazaret " kostas por  
unu persono, dum unu semajno :

- en unu persona ĉambro : 1660 FF
- en du persona ĉambro : 1493 FF

Mendo valoras nur kun antaŭpago de : 400 FF

La loĝado en " Le Lazaret " ne estas deviga. Oni povas partopreni  
nur la kursojn (tamen babilado dum la manĝoj gravas kaj estas tre  
agrabla), oni povas nur manĝi en "Le Lazaret", oni povas ĉu  
tendumi, ĉu logi en hotelo, ĉe amikoj .....

Por pliaj informoj turnu vin al :

ESPERANTO 5 rue du Docteur Roux 34000 Montpellier  
tel: 67 54 15 43

Bonvolu sendi koverton kun via adreso, Sendu la monon al  
CCP n° 2361 61 T Montpellier  
je la nomo: Centre Culturel Esperanto - Sem. Inter.

INTERNACIA ESPERANTOSEMAJNO - SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

SETE (FRANCIO): 09-09-96 ----> 16-09-96

ALIGILO (BULLETIN D'ADHESION)

Familia Nomo \_\_\_\_\_  
(Nom)

Persona Nomo \_\_\_\_\_  
(Prénom)

Adreso \_\_\_\_\_  
(Adresse)

Tel. Num. \_\_\_\_\_  
(N° de tél.)

(1) Mi loĝos en la familia domo "Le Lazaret"  
(Je logerai à la maison "Le Lazaret")

(1) Mi antaŭendas unu liton (1) en unu persona ĉambro  
(Je réserve un lit) dans une chambre pour une personne  
(1) en du persona ĉambro dans une chambre pour deux personnes

(1) Mi ne loĝos en la familia domo "Le Lazaret", sed mi manĝos regule.  
Je ne logerai pas à la Maison "Le Lazaret" mais j'y mangerai régulièrement

(1) forstreu la neutilan linion  
(rayer la mention inutile)

ESPERANTO 5 Rue du Docteur Roux 34000 Montpellier (Francio)  
Poŝta ĝirkonto en Francio: CCP n° 2361 61 T MONTPELLIER  
CENTRE CULTUREL ESPERANTO-SEMAINE INTERNATIONALE

A T T E N T I O N !!! A T T E N T U !!!

Bonvolu aldoni koverton kun via adreso  
(Veuillez joindre une enveloppe avec votre adresse)